

AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ

Accademia
Internazionale
delle Scienze

International
Academy
of Sciences



San Marino

Internationale
Akademie
der Wissenschaften

Académie
Internationale
des Sciences

okazigas sub la patroneco de la
Komunumo kaj de la Provinco de Rimini

3-an italan studadsesion lige al la

DEKOKA SANMARINA UNIVERSITATA STUDADSESIONO

SUS 18

Terza sessione universitaria italiana in collegamento con la
diciassettesima Sessione Universitaria Sanmarinese

Dritte italienische Studientagung in Verbindung mit der
achtzehnten Sanmarinesischen Universitären Studientagung

Third italian university session connected with the
eighteenth Sanmarinian University Session

Troisième séance universitaire liée avec la
dix-huitième Séance Universitaire Sanmarinienne

Rimini • San Marino

1997.08.30 — 09.05 / 1696-1697 pfr

Laborlingvoj ♦ Lingue di lavoro ♦ Arbeitssprachen ♦ Working languages ♦ Langues de travail:

la Internacia Lingvo (ILO)

e le lingue etniche ufficiali dell'AIS ♦ und die ethnischen offiziellen Sprachen der AIS ♦
and the ethnic official languages of AIS ♦ et les langues ethniques officielles de l'AIS:

italiano — Deutsch — English — français

SEKCIOJ KAJ FAKAROJ DE AIS

Kibernetiko (1. sekcio)

Dekano: OProf. Dr. habil. Reinhard FÖSSMEIER

Fakaro 1.1: Antropokibernetiko

Fakoj: psikokibernetiko, lingvokibernetiko, klerigkibernetiko, kibernetikaj komunikada kaj dokumentada sciencoj, socikibernetiko, ekonomikibernetiko

Fakaro 1.2: Ĝenerala kibernetiko

Fakoj: teorio de informacio kaj kodigo, teorioj de algoritmoj, logikaj ŝaltretoj, abstraktaj aŭtomatoj kaj adaptivaj (celorientitaj) sistemoj, teoria informadiko, komputil-arkitekturo, ĝenerala teorio de retrokoplado kaj reguligo, teorio de strategiaj ludoj

Fakaro 1.3: Inĝeniera kibernetiko

Fakoj: maŝina aŭ inĝeniera kibernetiko (teknologioj de telekomunikado, de informstorado, de reguligo, de komputiloj kaj de aŭtomacio, aplikata informadiko)

Fakaro 1.4: Biokibernetiko

Fakoj: genetiko, neŭrofiziologio, teorio de retrokoplado en organismoj, kibernetika medicino, komunikado kaj konduto de bestoj

Humanistiko (2. sekcio)

Dekano: OProf. Fabrizio PENNACCHIETTI dr.

Fakaro 2.1: Bazaj neparametraj antroposciencoj

Fakoj: neparametraj psikologio, lingvistiko, klerigscienco, komunikada kaj dokumentada sciencoj

Fakaro 2.2: Soci-sciencoj neparametraj

Fakoj: Neparametraj pedagogio, administraci-scienco, sociologio, ekonomiko, etnologio, jurscienco, politologio

Fakaro 2.3: Artsciencoj neparametraj

Fakoj: muzikologio kaj muzikhistorio, estetiko kaj historio de la porvidaj artoj, literaturscienco (speciale beletriko), estetiko kaj historio de la scenejaj artoj

Fakaro 2.4: Integraj kultursciencoj

Fakoj: etnologio, socigeografio, kulturgeografio, kompara religi-scienco, religihistorio, ekonomi-historio, ĝenerala historio, bibliotekscienco

Struktursciencoj (3. sekcio)

Dekano: OProf. Horst S. HOLDGRÜN dr.

Fakaro 3.1: Pensadstruktursciencoj

Fakoj: simbola logiko, teorio de (mal)precizaj aroj, ĝenerala aksiomatiko, aritmetiko, nombroteorio, probablokalkulo, matematika statistiko, matematik-didaktiko

Fakaro 3.2: Imagadstruktursciencoj

Fakoj: geometrio, kinematiko, ĝenerala sistemiko

Fakaro 3.3: Formalaj matematikaj sciencoj

Fakoj: algebro, teorio de serioj, funkcioj, ekvacioj, distribucioj ktp., kalkuloj de vektoroj, matricoj, diferencialoj, integraloj, ĝenerala strukturteorio

Filozofio (4. sekcio)

Dekano: OProf. Kjell SELLIN

Fakaro 4.1: Filozofiaj bazosciencoj

Fakoj: filozofia logiko, ontologio, semiotiko, ĝenerala modelteorio, epistemologio

Fakaro 4.2: Filozofiaj valorteorioj

Fakoj: filozofia estetiko, aksiologio, moralfilozofio, jurfilozofio, ŝtatfilozofio

Fakaro 4.3: Metasciencoj

Fakoj: historioj kaj filozofioj de la unuopaj sciencoj kaj sciencobranĉoj, idehistorio, historio de la filozofio, historio de la unuopaj sciencoj

Natursciencoj (5. sekcio)

Dekano: OProf. Hans-Dietrich QUEDNAU dr.

Fakaro 5.1: Substancikoj

Fakoj: fiziko, fizikaj teknologioj (konstrustatiko, mekanika teknologio, elektroteknologio, maŝinkonstruado), kemio, kemiaj teknologioj

Fakaro 5.2: Mondikoj

Fakoj: geosciencoj kaj astrosciencoj (astronomio, meteorologio, geodezio, naturgeografio, geologio, paleontologio)

Fakaro 5.3: Biosciencoj

Fakoj: ĝenerala biologio, biometrio, botaniko, zoologio, klasika (t.e. bio-)ekologio, humanbiologio, medicino, farmacio, nutradscienco

Morfosciencoj (6. sekcio) (teorioj kaj teknologioj de homa ĉirkaŭaĵo)

DEKANO: OProf. Dr. habil. Tyburcjusz TYBLEWSKI

Fakaro 6.1: Aŭdvidaj formkreado kaj dokumentado

Fakoj: sonstudioteknologio, grafika teknologio, sportscienco, filmstudioteknologio, sciencaj fotado, filmado, surbendigo ktp., muzeologio, parolteknologio, retoriko

Fakaro 6.2: Ilar-morfologio

Fakoj: ergonomiko, formigo de industriaj produktoj, laborformteknologio, formigo de laborlokoj

Fakaro 6.3: Mediplanado

Fakoj: arkitekturo, ĝardenformigo, agronomio, urba kaj regiona planadoj, trafikplanado, ĝeneraligita homo- kaj natur-ekologio, turismiko

Programo de la 3-a itala studadsesio lige al la 18-a Sanmarina Universitata Studadsesio de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino

Sciencaj kursoj kaj prelegoj okazas en la mezlernejo
Scuola Media 2 „Dante Alighieri“, Via Coletti 102, I-47037 Rimini
(en la loĝkvartalo „San Giuliano Mare“); tel. +39/5421-52082

La SUS-oficejo troviĝas samloke (akcepto ekde 01.09.1997, 8:30)

I. OFICIALAĴOJ

dato	tago	hor	okazaĵo	salono
31.08	dimanĉo	ekde la 10h	senatkunsido (nepublika)	
31.08	dimanĉo	14:00-15:00	ekzamenofico (membrokunsido)	
01.09	lundo	13:45-14:15	ekzamenofico (konsultoj)	Euklides
01.09	lundo	15:45-16:30	Asembleo de la Subtena Sektoro	¹ Boulangier
01.09	lundo	17:00-18:00	inaŭguro de la sesio	² Boulangier
03.09	merkredo	18:00-19:00	kunsido de Akademia Libroservo	sciigota
03.09	merkredo	20:00-20:30	sekcikunsidoj	¹ Boulangier
03.09	merkredo	20:30-22:00	Forumo pri Akademias Rekomendoj	¹ Boulangier
05.09	vendredo	ekde la 10h	ekzamenoj	³ Boulangier
05.09	vendredo	15:30-16:00	23-a Ĝenerala Asembleo de la Scienca Sektoro	³ Boulangier
05.09	vendredo	16:00-17:00	solena fermo	³ Boulangier

¹ en Rimini-San Giuliano Mare, en la konstruaĵo de iama biblioteko ĉe Viale C. Zavagli 73 (enirejo de la preĝejo placeto, dekstre)

² en la salono *Sala degli Archi Numero 1* ĉe la Komunumo situanta en la ĉefa komunuma palaco ĉe Piazza Cavour (ĉ. 20-minuta piedirdistanco de la kursejo)

³ en San Marino Città, en la salono de la „Grand Hotel San Marino“

II. SCIENCAJ KURSOJ

(po 1 studunuo, kun libervola finekzameneto por enskribiĝintoj)

*La sekvaj sciencaj kursoj okazos ekde lundo ĝis ĵaŭdo (01-04.09)
po 2 instruhoroj tage en la samaj tempintervaloj.*

Kibernetiko (salono Schmidt)

- K 01 OProf. Dr. habil. Reinhard FÖSSMEIER, München (D):
„**Prudenta programado**“, 9:00-11:00
- K 02 OProf. Dr. habil. Helmar FRANK, Paderborn (D):
„**Informaciestetiko**“, 11:00-13:00

Humanistiko (salono Komenský)

- H 01 Mag. Josef DÖRR, Quierschied (D),
kun enkonduko de OProf. Fabrizio PENNACCHIETTI dr., Torino (I):
„**La verkaro de Karolo Piĉ**“, 11:00-13:00
- H 02 OProf. Carlo MINNAJA dr., Padova (I):
„**Problemoj pri tradukado al esperanto el diversaj literaturaj
ĝenroj**“, 14:00-16:00

En la kadra programo de la sesio la dua sekcio okazigas paralele al la sciencaj kursoj (lunde, marde, ĵaŭde kaj vendrede, ĉiam inter la 9-a kaj 11-a horo) latinan simpozion („Symposium Latinum“). La tie prezentotaj prelegoj okazas latinlingve.

Struktursciencoj (salono Euklides)

- S 01 OProf. Horst S. HOLDGRÜN dr., Göttingen (D):
„**Distribucioj**“, 9:00-11:00

Natursciencoj (salono Galilei)

- N 01 ADoc. Mag. Alicja LEWANDERSKA-QUEDNAU, Freising/Gliwice,
kun enkonduko de OProf. Hans-Dietrich QUEDNAU, Freising (D):
„**Unua helpo kaj enkonduko al anatomio kaj fiziologio**“, 9:00-11:00
- N 02 OProf. Hans Michael MAITZEN dr., Wien (A):
„**La kometoj kaj la planedara ekologio**“, 11:00-13:00
- N 03 OProf. Dr. Wim DE SMET, Kalmthout (B):
„**Cetacoj**“, 14:00-16:00

III. LIBERAJ PRELEGOJ

Natursciencoj

N-p1 ADoc. Mag. Alicja LEWANDERSKA-QUEDNAU, Freising/Gliwice:
„Lino kiel akompananto de homa vivo“
02.09 (mar.), 14:00-14:40, salono Gandhi

Morfosciencoj

M-p1 ADoc. Mag. Alicja LEWANDERSKA-QUEDNAU, Freising/Gliwice:
„Enkonduko al ergonomiko kaj nuna scienca teorio pri la kaŭzoj
de akcidentoj“; 03.09 (mer.), 14:00-14:40, salono Gandhi

IV. LINGVOKURSO

L 01 ISKanino Liana TUHVATULINA, Dmitrov (RUS):
„ILO por sciencistoj“; 30.08 (sab.) kaj 31.08 (dim.),
11:00-13:00, 14:00-16:00, salono Boulanger (en la konstruaĵo de iama
biblioteko ĉe Viale C. Zavagli 73; enirejo de la preĝeja placeto, dekstre)

Resumoj de kelkaj sciencaj kursoj

„Prudenta programado“ (OProf. Dr. habil. Reinhard Fößmeier)

Kredeble preskaŭ neniu iom granda komputila programo estas senerara, kaj la eraroj povas kaŭzi grandajn malutilojn. Konata estas la perdo de la unua raketo de tipo „Ariane 5“, kiun kaŭzis programara eraro. Tial la evito de eraroj, aŭ protekto kontraŭ eraroj, fariĝis grava vidpunkto en programado; plej ofte pli grava ol, ekzemple, rapideco de programoj. La kurso prezentas la problemojn kaj la eblajn teknikojn de „prudenta programado“, kiuj celas sekurigi programojn kontraŭ eraroj.

„Problemoj pri tradukado al esperanto el diversaj literaturaj ĝenroj“

(OProf. Carlo Minnaja dr.)

La kurso rilatas al la problemoj de tradukado el nacia lingvo precipe de beletraĵoj, sed kun aludoj ankaŭ al leksikografio. Estas prenitaj pluraj ekzemploj el la diversaj ĝenroj: teatro, poezio, prozo. Estos ekzamenataj solvoj iom detale, kun aparta atento al la itala kiel fontolingvo, kun konsideroj pri fideleco al la signifo, al la rimoj, al la ritmo, al la sono. Lastaj bazaj elementoj pri diversaj sistemoj de aŭtomata tradukado estas proponitaj kursfine.

„La kometoj kaj nia planedara ekologio“ (OProf. Hans Michael Maitzen dr.)
Kometoj estas postrestaĵoj el la unuaj fazoj de la estiĝo de nia sunsistemo. Ili konsistigas la dinamike nestabilan parton de la astroj orbitantaj ĉirkaŭ la sunon, ne laŭ proksimume cirkla orbitoj, sed tre ekscentraj. Tio sekvigas, ke ili vizitas ĉiujn regionojn de nia planedara sistemo, eĉ inkluzive de la planedoj mem, en formo de kolizioj, kiuj unuflanke havas katastrofan efikon, sed ankaŭ liveras la bazon por ekologia pluevoluo de la biosfero. En la kazo de nia Tero, kometo verŝajne nuligis la ĝeneralan pluekziston de la dinosaŭroj antaŭ 65 milionoj da jaroj, aliflanke kometoj probable alportis per siaj glaciamasoj la akvon, kiu konsistigas niajn oceanojn, la elirsferon de la vivo. En la prelego estos prezentataj ankaŭ la plej aktualaj kometeventoj, inter ili la sensacia apero de la kometo Hale-Bopp, kiu en tiu ĉi jaro fascinis la homaron en la norda hemisfero.

„Distribucioj“ (OProf. Horst S. Holdgrün dr.)

Fizikistoj ŝatas uzi funkcion kun unu reela variablo, kiu alprenas ĉie la valoron 0 escepte ĉe 0, kie ĝi estu tiom granda, ke ĝia integraĵo egalu al 1. Estas facila ekzercmontri, ke tia stranga funkcio [en la kutima senco] ne povas ekzisti. Matematikistoj ĉagreniĝas, ke multaj funkcioj — eĉ kontinuaj — ne nepre estas deriveblaj, do ne eblas analizi ilin per tiu akra instrumento de la analitiko. En ambaŭ [kaj multaj aliaj] kazoj helpas la enkonduko de objektoj, kiuj ĝeneraligas la funkciojn kaj senlime estas deriveblaj: la distribucioj. Nia kurso donos superrigardon pri la ĉefaj ecoj de tiuj interesaj matematikaj objektoj.

„Unua helpo kaj enkonduko al anatomio kaj fiziologio“

(ADoc. Mag. Alicja Lewanderska-Quednau)

En la kurso, post la enkonduko de kelkaj informoj kaj difinoj de malsano, turismo, veturado kaj akcidentoj, sekvos priskribo de diferencoj inter akcidento, malsano pro veturado kaj subita malsano. Por pli bona kompreno estos skize montrataj la necesaj metodoj de provizora sekurizado — kun enkonduko en homan anatomion. Por gestudentoj estas utilaj ekzamentestoj, kiuj helpas kompletigi iliajn jam pli frue konatajn sciojn. La kurso parte estos prezentita pollingve kaj en ILo kun sekvontaj ilin germantradukitaj tekstoj.

V. KANDIDATPRELEGOJ

La finekzameno por kandidatoj, kiuj celas originale aŭ per adapta adopto akiri ĉe AIS la agnoskon de akademia nivelo (bakalaŭreco, magistrecio, doktoreco aŭ habilit-doktoreco) okazos antaŭtagmeze, la *5-an de septembro* (vendredon). La interkonsentitaj horoj estos afiŝitaj. Laŭnecesaj skribaj ekzamenoj (inkluzive la kursfinajn ekzamenetojn) okazos jaŭde. Buŝaj nepublikaj fakekzamenoj okazos laŭ interkonsento kun la ekzamenantoj. La kandidatprelegoj estas publikaj.

La ekzamenoficon por la jaroj 1996–1999 konsistigas:

Direktoro: OProf. Fabrizio Pennacchietti dr.

Asistanto: ADoc. Joanna Lewoc

sekcio 1 (kibernetiko): OProf. Dr. habil. Reinhard Föbmeier
sekcio 2 (humanistiko): AProf. Mag. Heinrich Dingeldein dr.
sekcio 3 (struktursciencoj): OProf. Carlo Minnaja dr.
sekcio 4 (filozofio): OProf. Kjell Sellin
sekcio 5 (natursciencoj): OProf. Hans Michael Maitzen dr.
sekcio 6 (morfosciencoj): OProf. Dr. habil. Tyburcysz Tyblewski

VI. KADRA PROGRAMO

Ĵaŭdon, la 4-an de septembro (de la 21-a ĝis la 24-a horo) SUSanoj povos partopreni kune kun kongresanoj de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) la surmaran boatekskurson laŭ la bordo de la riviero. La antaŭvidataj kostoj de la ekskurso estas po 10.000-18.000 italaj liroj por ĉiu persono.

En la kadro de la latina simpozio, en ĝia kultura programo s-ino Jolanta Sutowicz prezentos dum unu horo latinlingvajn poemojn el la verkoj de la mezepoka Germanino Hroswitha von Gandersheim kaj kelkajn religiajn poeziaĵoj de la Sankta Hildegardis kaj Heloise. La programo komenciĝos per esperantlingva enkonduko. La prezentado okazos vendrede vespere (ekde la 20:30) en la eksa biblioteko ĉe Viale C. Zavagli 73.

Tiuj, kiuj post la sesio intencas libertempi en Rimini, povas partopreni sabate vespere, la 6-an de septembro, en Parco Briolini (ne fore de hotelo Corazza) regionan folkloran vesperon organizatan de la Turisma Komitato.

SUS-partoprenantoj estas tre bonvenaj partopreni ĉiujn supre menciitajn okazaĵojn.

Kursoj kaj kursfinaj ekzamenoj

La fakajn kursojn kaj prelegseriojn (po 8 studhorojn) dum SUS gvidas efektivaj membroj de AIS eventuale en kunlaboro kun adjunktoj de AIS.

Enskribiĝintoj al la kurso rajtas postuli oficialan ĉeestateston, se ili ĉeestis minimume 3/4-jn, kaj noton, se ili partoprenis la kursfinan ekzamenon. La ekzameno povas okazi en skriba formo laŭ la metodo de elekt-respondoj aŭ eventuale de liberaj respondoj, se la respondo nur konsistas el nomoj aŭ nom-

broj, tiel ke sufiĉas la kompreno de ILo kaj ne necesas propra esprimkapablo en la internacia lingvo.

Ankaŭ pri la *aŭdividaj kursoj* ofertataj el la instruteko povas okazi ekzameno por kandidatoj, kiuj estis aŭ luprenintaj aŭ aĉetintaj la kurson, aŭ ĝin enskribiĝinte (se estas ofertataj) plejgrandparte sekvis dum SUS mem; ĉiukaze atesto validas kiel pruvilo de akirita studunuo nur tiam, se la noto estas minimume 7/10.

Ĉiuj SUS-partoprenantoj rajtas senpage kaj ne ekzameniĝante sekvi ĉiujn kursojn (por tio sufiĉas la aliĝkotizo). Por tiuj, kiuj intencas ricevi kursateston estas konsilinda — pro administraj kaj organizaj kialoj — frua enskribiĝo al kursoj ĉe la SUS-oficejo (t.e. lunde, la 1-an de septembro!)

Ĉiu kandidato antaŭ sia finekzameniĝo nepre devas esti enskribiĝinta al minimume 3 kursoj de SUS, inter kiuj:

- ✓ minimume unu devas esti el la sekcio, en kiu li kandidatiĝas;
- ✓ minimume unu devas esti el alia sekcio;
- ✓ maksimume unu de la tri devigaj kursoj povas esti ILo-kurso.

En almenaŭ unu kurso la kandidato devas partopreni la ekzamenon ricevante minimume la noton 6/10 (aŭ 7/10, se temas pri kurso el la instruteko). La kursfinan ekzamenon eblas ripeti. **Por la fina ekzameno ne estas akceptebla kandidato, kiu nenium SUS-kurson plejgrandparte sekvis kaj sukcese finis per ekzameno dum la SUS mem.**

Pro la ankoraŭ okazanta prezentiĝado de kandidatoj al la fina ekzameno sen kompletigi kaj disponigi konforme al la ekzamenregularo ĉiujn necesajn erojn al la ekzamenoficejo, oni

! *aŭ rifuzos, ke kandidato havigu mankantan eron post la publika fina ekzameno*

! *aŭ li devos pagi rekompencan superantan la normalan ekzamenkotizon pro la kromlaboro.*

Por eviti tion bv. ankoraŭfoje certiĝi, ĉu ĉiuj viaj dokumentoj necesaj por la ekzameniĝo jam troviĝas ĉe la ekzamenoficejo!

Prelegoj

En ĉiu sekcio la plejmulto de la prelegoj okazu en ILo. La partopreno en unuopaj prelegoj (kontraŭe al la partopreno en prelegserioj!) por kandidatoj ne egalvaloras al kurspartopreno. La prelegkunsidoj estas gvidataj de la dekanoj (aŭ vicdekanoj) de la koncerna sekcio aŭ taskigitaj de ili. *(daŭrigo sur la paĝo 13)*

3-a itala studadsesio lige al la
18-a Sanmarina Universitata Studadsesio (SUS 18)
Rimini – San Marino, 1997.08.30 – 09.05 / 1696-1697 pFR

	sekcio / salono	9:00–11:00	11:00–13:00	14:00–16:00	vespere
SABATO 1997-08-30 /1696 pFR	Boulangier ¹		L 01 Tuhvatulina	L 01 Tuhvatulina	
DIMANĈO 1997-08-31 /1696 pFR	Boulangier ¹	senatkunsido (nepublika) (ekde la 10h)	L 01 Tuhvatulina	L 01 Tuhvatulina ekzamenofico (membrarkunsido, 14-15)	
LUNDO 1997-09-01 /1696 pFR	Boulangier 1 Schmidt 2 Komenský 3 Euklides 4 Descartes 5 Galilei 6 Gandhi	K 01 Fößmeier Symposium Latinum S 01 Holdgrün N 01 Lew.-Q./Quednau	K 02 Frank H 01 Dörr/Pennacchiotti N 02 Maitzen	Asembleo/SubS¹ (15:45-16:30) H 02 Minnaja ekzamenofico (Euklid.) (konsultoj, 13:45-14:15) N 03 De Smet	Inaŭguro de la sesio² (17-18)
MARDO 1997-09-02 /1696 pFR	1 Schmidt 2 Komenský 3 Euklides 4 Descartes 5 Galilei 6 Gandhi	K 01 Fößmeier Symposium Latinum S 01 Holdgrün N 01 Lew.-Q./Quednau	K 02 Frank H 01 Dörr/Pennacchiotti N 02 Maitzen	H 02 Minnaja N 03 De Smet N-p1 / /	

	sekcio / salono	9:00–11:00	11:00–13:00	14:00–16:00	vespere
MERKREDO 1997-09-03 /1697 pFR	1 Schmidt 2 Komenský 3 Euklides 4 Descartes 5 Galilei 6 Gandhi	K 01 Fößmeier S 01 Holdgrün N 01 Lew.-Q./Quednau	K 02 Frank H 01 Dörr/Pennacchiotti N 02 Maitzen	H 02 Minnaja N 03 De Smet M-p1 / /	Akad. Libroserv. (membrarkuns. 18-19) sekcikunsidoj¹ (20-20:30) Forumo pri Akademiaj Rekomendoj¹ (20:30-22)
JAŬDO 1997-09-04 /1697 pFR	1 Schmidt 2 Komenský 3 Euklides 4 Descartes 5 Galilei 6 Gandhi	K 01 Fößmeier Symposium Latinum S 01 Holdgrün N 01 Lew.-Q./Quednau	K 02 Frank H 01 Dörr/Pennacchiotti N 02 Maitzen	H 02 Minnaja N 03 De Smet	Boatekskurso (21-24)
VENDREDO 1997-09-05 /1697 pFR	Boulangier ³ 2 Komenský Boulangier ¹	Ekzamenoj (ekde la 10h) Symposium Latinum		Ĝen.As./SciS (15:30-16)	Fermo (16-17) Latinaj poemoj (ekde 20:30)

¹ en Rimini-San Giuliano Mare, en la konstruaĵo de iama biblioteko, Viale C. Zavagli 73 (enirejo de la preĝeja placeto, dekstre)

² en la salono *Sala degli Archi Numero 1* ĉe Piazza Cavour (ĉ. 20-minuta piedirdistanco de la kursejo)

³ en San Marino Città, en la salono de la „Grand Hotel San Marino“

La salonoj estas nomitaj honore al la jenaj eminentaj personoj:

George R. BOULANGER (1909–1982)

Fondinto (en 1957) de l'Association Internationale de Cybernétique (Namur, B) kaj ties prezidanto ĝis la morto; enkondukis en ĉi tiun asocion 1980 ILo kiel trian laborlingvon, eklerninte ĝin kiel 70-jarulo; vicprezidanto de la Eŭropa Klubo kaj membro de ties iniciatgrupo AIS.

René DESCARTES, latine: Renatus Cartesius, (1596–1650)

„La patro de la moderna filozofio“, kiel oni ofte nomas lin, provis ligi filozofion al la natursciencoj aplikante por ambaŭ racian metodon. Li skizis principojn de planlingvo en letero de 20.11.1629 al la benediktana scienculo Mersenne.

EUKLEIDES de Aleksandrio (ĉ. 300 a.K.)

Greka matematikisto kaj naturesploristo, kiu laboris sub Ptolomaio I ĉe la „Museion“ en Aleksandrio. Lia plej fama verkaĵo estas la libro „Elementoj“, aksioma prezento de la tuta tiama geometrio kaj aritmetiko. Krome li verkis inter alie manualon „Geometria optiko“ kaj aliajn traktaĵojn pri planimetrio, sferoj kaj matematika muzikteorio.

Galileo GALILEI (1564–1642)

Kvankam liaj ideoj troviĝas kadre de la kristana mondkoncepto, la itallingva natursciencisto konfliktis kun la katolika eklezio pro sia verko pri la galaksi-modeloj, en kiu li argumentas por la nova, kies centro estas la suno. Kiel unu el la unuaj sciencistoj li verkis ne plu en la latina lingvo, nekomprenata de pli vasta publiko.

Mohandas Karamchand GANDHI (1869–1948)

Hinda politikisto, kiu proklamis senarman ribelon kontraŭ la okupadaj trupoj, per manspinado kontraŭ la tekstilaj fabrikoj de Britio, per „salmarŝo“ kontraŭ la brita salmonopolo, per reiro al simpla natura vivoformo, por formi sendependan komunan ŝtaton de hinduoj kaj islamanoj. Li subtenis la ideon de la Internacia Lingvo, kunlaborante kun la svisa sciencisto Edmond Privat.

Jan A. KOMENSKÝ, latine: Johannes A. Comenius (1592–1670)

La fondinto de moderna pedagogio ne nur teorie, sed ankaŭ praktike kontribuis al sia fako, i.a. per facila lingvoinstrua legolibro. Li proponis la enkondukon de planlingvo kaj la starigon de internacia akademio de la sciencoj.

Hermann SCHMIDT (1894–1968)

Jam en 1941 la germana fizikisto kaj reguladteknikisto prezentis la bazajn principojn de kibernetiko. Ekde ĉ. 1962 li pli kaj pli influis la filozofion de la klerkibernetiko kaj de aliaj antropokibernetikaj branĉoj.

(daŭrigo el la paĝo 9)

♦ Okazontaj (ĉiuj en ILo) **debutprelegoj de novaj profesoroj kaj docentiĝ-prelegoj de estontaj plenrajtaj docentoj de AIS** ne daŭru pli longe ol po 45 (inkluzive diskuton kaj paŭzeton: 60) minutojn.

♦ La sama tempo estas je dispono por **invititaj prelegoj** en iu ajn oficiala lingvo de AIS kaj por **projektaceptigaj prelegoj** (en ILo) de kandidatoj, kiuj celas estontan *originalan akiron* (ne: adopton) de titolo ĉe AIS.

♦ Ankaŭ de liberaj ISKanoj (t.e. de ISKanoj, kiuj ankoraŭ ne apartenas kiel adjunktoj aŭ efektivaj membroj al AIS) **liberaj prelegoj** estas akcepteblaj de la dekano de la koncerna sekcio. Liberaj prelegoj en iu ajn oficiala lingvo de AIS ne daŭru pli longe ol po 25 (inkluzive diskuton kaj paŭzeton: 40) minutojn.

♦ Kromaj **koncizprelegoj** daŭras po 10–15 (inkluzive demandojn kaj paŭzeton: 20) minutojn kaj rajtas okazi ankaŭ en ajna oficiala lingvo de AIS. Ili estas ankoraŭ post la limdato por la starigo de la SUS-programo (aŭ eĉ surloke) oferteblaj pere de la (vic)dekano aŭ (vic)fakarestro de la koncerna sekcio. Ĉiuj temoj de tiuj kromaj koncizprelegoj (t.e. ne surlistigitaj en la programkajero) estos bontempe afiŝataj dum SUS laŭ la indikoj de la prelegontoj al la SUS-oficejo.

Aliĝo

La aliĝkotizon (ĝis la **29-a de julio 1997**: 0,3 AKU = 37,50 DM), bv. pagi:

- al la AIS-konto: poŝtgirokonto 2051-305 ĉe poŝtbanko Hannover (bankkodo 25010030) aŭ
- ĉeke — senpere al la trezoristo: OProf. B.-A. Wickström, Institut für Finanzwissenschaften, Humboldt Universität, Spandauer Str. 1, 10178 Berlin (*tiukaze, bv. nepre aldoni minimume [egalvaloron de] 15,00 DM pro la bankkostoj*)

kun nepra indiko: „*Aliĝo al la 18-a SUS de ...*“, aldonante majuskle vian NOMON. Post la 29-a de julio (do ankaŭ dum la sesio mem) la aliĝkotizo estos 0,5 AKU (62,50 DM aŭ egalvaloro en aliaj devizoj).

La aliĝkotizon (laŭ art. 3.4 de la kotizregularo) pagu ankaŭ kursgvidontoj kaj prelegontoj. La eventualaj honorarioj pro la gviditaj kursoj, prelego kadre de prelegserioj aŭ realigita prelego akceptita por la antaŭe presita programo estos alkalkulita al la servobonhavo de tiu partopeninto post la sesio.

Liberigitaj de la aliĝkotizo estas tiuj dumvivaj subtenaj membroj kaj la AIS-studentoj kun la valida studenta legitimilo (ili nepre indikuan studentan numeron), kiuj aliĝas bontempe, t.e. minimume unu

monaton antaŭ okazigo de la AIS-studadsesio al la senata sekretario; alikaze estas krompagenda 0,2 AKU.

La studenta legitimilo estas akirebla kontraŭ 0,5 AKU. Ĝi validas ĝis la atingo de la indikenda studadcelo, sed ne pli longe ol 3 plenajn kalendarajn jarojn. Ĝi estas havebla ĉe la senata sekretario ADoc. Joanna Lewoc ankaŭ dum la sesio mem. Interesitoj bv. disponigi sian aktualan foton (laŭeble en la formato 22,3 mm oble 32 mm).

La aliĝo rajtigas:

- ✓ senpage partopreni ĉiujn kursojn, prelegseriojn, prelegojn (debut-, docentig-, gast-, konciz-, projektakceptigajn kaj liberajn prelegojn), ekzamenigojn kaj publikajn oficialaĵojn (la enskribo al kursoj aŭ prelegserioj necesas nur tiam, se oni celas ĉeestad-ateston aŭ volas ekzamen-partoprenon pri ĝi), *(enskribiĝkotizo al unu kurso estas 0,3 AKU; rabatoj ne ekzistas)*
- ✓ ricevi la programkajeron kaj — fine de la sesio — partoprenantaron,
- ✓ senpage partopreni ĉiujn erojn de la kadra programo, pri kiuj la programo aŭ SUS-oficejo ne informas pri pagenda kromkotizo,
- ✓ ricevi propran insignon, kiu konfirmas la laŭregularan aliĝon (ĉe AIS-studentoj la insignon anstataŭas ilia aktuala legitimilo).

Ĉiu aliĝo por la aktiva partopreno en la sesio (ekz. kurs-, preleg-anonco) kaj por kandidatiĝo estas pritraktebla nur post la alveno de la SUS-aliĝkotizo (bonvolu atenti, ke aliĝkotizo ne kovras ekzamenkostojn, tranokt-kostojn ktp.)! Se la stato de via servobonhavo ampleksas necesan sumon, ne estas bezonata kroma ĝirado. La aliĝkotizo estos deprenita aŭtomate post via anonciĝo al la sesio.

Loĝado

Bv. memstare aranĝi vian restadon (inkluzive mendon de tranoktejo). Jen kelkaj hoteloj situantaj proksime al la ĉefa sesiejo:

- Hotel „Amarcord“, Via Garattoni 27, tel. +39/541-21734
- Villa „De Anna“, Via C. Zavagli 94, tel. +39/541-25722
- Pensione „Villa Dina“, Via Gaerano Tonini 49, tel. +39/541-24355
- Hotel „Corazza“, Via Garattoni 14, tel. +39/541-21668
- Hotel „Marinarella“, Via Rinaldi 13, tel. +39/541-25970.

La kostoj por kompleta tag-pensiono atingas mezume ĉe ĉiuj listigitaj hoteloj ĉ. 60.000 italaj liroj. La hoteloj estas bonkvalitaj kaj situas proksime al la marbordo (proks. duona kilometro). Estas konsilinde frue rezervigi ĉambron por antaŭvidata tempo.

La hoteloj kaj pensionoj estas atingeblaj de la ĉefa stacidomo en Rimini per buso n-ro 4 aŭ 8, kiuj veturas al la ĉefa sesiejo. De tie oni facile povas piediri (ĉ. 500-700 metrojn) al la elektita loĝloko. La bileto aĉetebblas ĉe budo apud la koncerna bushaltejo aŭ ĉe la stacidoma kafejo (1.200-1.300 LIT); taksi-kosto unudirekten estas 10.000-15.000 LIT.

La vendreda programo de la sesio okazos en la Respubliko San Marino. De Rimini vi povas memstare atingi San Marinon uzante taksion (50.000-60.000 LIT) aŭ buson (la bileto unudirekten kostas ĉ. 8.000 LIT) ekveturantan i.a. de la stacidomo ĉe la Placo L. Clementini. La busoj kursas en ĉ. 1-horaj tempointervaloj; la unuaj (ambaŭdirekten) ekveturas ĉirkaŭ la 7a horo, la lastaj — ĉirkaŭ la 20a.

Mono

Kadre de AIS kostoj kaj prezoj estas indikataj ĝenerale en „Akademiaj Kotiz-Unuoj“ (AKU). 1 AKU estas la laŭeble stabila jarkotizo de la Subtena Sektoro kaj validas nun 125,- DM. Subtenaj membroj same kiel ĉiuj membroj de la Internacia Scienca Kolegio (ISK), Internacia Arta Kolegio (IAK) kaj Internacia Teknika Kolegio (ITK) de AIS havas — konforme al la regularo pri kotizoj kaj mastrumado — propran „servobonhavo“, t.e. AIS-konton, de kiu eblas

- senkoste ĝiri al aliaj individuaj AIS-kontoj aŭ pagi al AIS,
- je 3%-a kosto depreni dum SUS monon en DM aŭ en LIT kaj
- ĝiri al banka aŭ poŝta ĝirokontoj je 5%-a kosto (aŭ senkoste, se temas pri pagendaj fakturoj por varoj aŭ servoj necesaj por agadi favore al celoj de AIS).

Al servobonhavo estas aŭtomate alkalkulataj honorarioj, aŭtomate dekalkulata estas la jarkomence pagenda membrokotizo. Kromaj dekalkuloj okazas laŭ sciigo de la servobonhavo-posedanto (ekz. aliĝkotizoj, ekzamenkotizoj k.s.), se la kontostato tion ebligas. Restadkosto dum SUS estas surbaze de fakturoj senkoste repageblaj el la servobonhavo de la partoprenanto, kiu devas bontempe zorgi pri ĝia sufiĉa stato.

Ĉe la SUS-oficejo ne eblas ŝanĝi monon inter diversaj monistemoj.

SENATO KAJ SENATAJ OFICOJ 1996–1999

Prezidanto: OPROF. DR. HABIL. HELMAR FRANK

Kleinenberger Weg 16, D-33100 Paderborn; tel.: +49/5251-163511;
fakse: +49/5251-163533

La prezidanton anstataŭas la vicprezidanto. La prezidanto:

- (1) kunordigas laboron de la senato,
- (2) gvidas la kunsidojn de la senato kaj de la Ĝenerala Asembleo,
- (3) enregistras kaj publikigas (kune kun la direktoro de la ekzamenofico) la agnoskitajn sciencistajn gradojn kaj titolojn,
- (4) kontrolas (kune kun la vicprezidanto) la plenumitecon de la kondiĉoj por rangoplialtigo,
- (5) subskribas kaj stampas la dokumentojn pri alvoko aŭ agnosko de sciencista grado,
- (6) iniciatas kaj flegas novajn kontaktojn al eksteraj institucioj kaj elstaraj personecoj.

Vicprezidanto: OPROF. FABRIZIO PENNACCHIETTI DR.

Via delle Rosine 10, I-10123 Torino; tel.: +39/11-8178242;
fakse: +39/11-8171053; rete: pennacch@cisi.unito.it

La vicprezidanto ne havas anstataŭanton (en la kazo de bezono liajn taskojn transprenas la prezidanto). La vicprezidanto estas samtempe direktoro de la Scienca Sektoro (SciS) kaj estro de la Internacia Scienca Kolegio (ISK). Krome li

- (1) kunordigas laboron de la dekanaro,
- (2) akceptas (kune kun la prezidanto) ISKanojn,
- (3) instigas kune kun la dekanoj al plenumo de kondiĉoj por rangoplialtigo,
- (4) kontrolas kune kun la dekanoj la enhavon de ISD,
- (5) proponas al la prezidanto legitimajn rango-plialtigojn de ISKanoj,
- (6) postulas protokoladon de sekcikunsidoj kaj elektadon de dekanoj kaj vicdekanoj.

Senatano pri financoj, direktoro de la financofico kaj trezoristo: OPROF. BENGT-ARNE WICKSTRÖM DR.

Institut für Finanzwissenschaft, Humboldt Universität, Spandauer
Str. 1, D-10178 Berlin; tel.: +49/30-20935655; fakse: +49/30-2093572;
rete: wick@wiwi.hu-berlin.de

(Vicdirektoro: OProf. Dr. habil. Helmar FRANK)

La financofico

- (1) utiligadas la AIS-kontojn,
- (2) kunlaboras kun la landaj aŭ regionaj sekcioj kaj asocioj pri financaj aferoj,
- (3) admonadas la pagon de pagendaj kotizoj,
- (4) varbadas novajn subtenajn membrojn,
- (5) faras kaj kontrolas investojn,
- (6) administras la fondusojn kaj pruntojn,
- (7) administras la servobonhavojn,
- (8) zorgas pri la librotenedo,
- (9) starigas la spezoekalkulon kaj la bilancon laŭeble ĝis la marto de la sekvanta jaro,

- (10) proponas al la ĜA la buĝeton por la sekvanta jaro kaj kontrolas ties plenumon,
- (11) proponas al la Asembleo de la Subtena Sektoro la AKU-valoron,
- (12) serĉadas novajn financajn rimedojn,
- (13) kunlaboras kun la revizoraro,
- (14) luprenas aŭ aĉetas buĝetkonforme laborlokojn (buroojn, kunvenejojn, instruojn),
- (15) kontraktadas kun landaj sekcioj aŭ asocioj aŭ kun aliaj eksteraj (precipe: jure memstaraj) organizoj pri eventuala transprenado de havaĵoj kaj taskoj de AIS.

Senatano pri protokolado, direktoro de la protokolofico kaj Senata Sekretario: ADOC. MAG. JOANNA LEWOC

Karl-Schwarzschild-Weg 6/317, D-37077 Göttingen;
tel.: +49/551-376072; rete: blewo1@pbhrzc.uni-paderborn.de

Vicdirektoro: OProf. Horst S. HOLDGRÜN dr.
Mathematisches Institut, Bunsenstr. 3-5, D-37073 Göttingen
tel.: +49/551-397764; fakse: +49/551-392985;
rete: holdgrun@uni-math.gwdg.de

La protokolofico

- (1) daŭrigas kaj konservas la protokolojn de la ĜA kaj de la senato,
- (2) zorgas pri la publikigado de ĉi tiuj protokoloj kaj de tiuj de la asembleo de SubS,
- (3) daŭrigas kaj konservas la registron de la studadsesioj de AIS (datoj, lokoj, kursoj),
- (4) starigas kune kun la dekanoj la SUS-programon,
- (5) administras kune kun la trezoristo la SUSojn,
- (6) transprenas la rutinan korespondadon.

Senatano pri ekzamenoj kaj direktoro de la ekzamenofico: OPROF. FABRIZIO PENNACCHIETTI DR.

Via delle Rosine 10, I-10123 Torino; tel.: +39/11-8178242;
fakse: +39/11-8171053; rete: pennacch@cisi.unito.it

Membroj:

OProf. Carlo MINNAJA dr. (vicdirektoro),
ADoc. Mag. Joanna LEWOC (asistanto)

La ekzamenofico

- (1) antraŭpritraktas kandidatiĝojn,
- (2) korespondas kun la kandidatoj kaj eventuale kun ekspertizantoj,
- (3) starigas la unuopajn ekzamenkomitatojn kune kun la koncernaj dekanoj,
- (4) organizas la ekzamenojn kune kun la koncernaj dekanoj,
- (5) zorgas pri la starigo kaj havigo de la atestoj, pri la enregistriĝo kaj pri la dokumentoj,
- (6) konservas la ekzamenaktojn.

Senatano pri la akademia strukturo kaj direktoro de la struktur- ofico: OPROF. DR. HABIL. TYBURCJUSZ TYBLEWSKI

Bartka Zwyciezcy 11/1, PL-58-500 Jelenia Góra; tel.: +48/75-23112

(Vicdirektoro: OProf. Hans Michael MAITZEN dr.)

La strukturoficio

- (1) observas la agadon de la regionaj kaj landaj asocioj, kolektante protokolojn ktp.,
- (2) kunordigas la kunlaboron de AIS kun landaj/regionaj asocioj en la filioj,
- (3) kontraktas pri klerigejoj de AIS kaj kontrolas la kontraktplenumadon,
- (4) prizorgas la Artan kaj Teknikan Sektorojn,
- (5) zorgas pri laŭbezona nomumado de (vic)dekanaj kaj fakar(vic)estroj,
- (6) administras aŭ administrigas lokajn instituciojn aŭ akademidomojn.

Senatano pri studado kaj direktoro de la klerigoficio:

OPROF. HANS-DIETRICH QUEDNAU DR.

Forstwissenschaftliche Fakultät, Am Hochanger 13; D-85354 Freising; tel.: +49/8161-714765; fakse: +49/8186-714767;
rete: quednau@lrz.uni-muenchen.de

(Vicedirektoro: OProf. Dr. habil. Reinhard FÖSSMEIER)

La klerigoficio

- (1) daŭrigas la liston de la studentoj kaj donas studentajn legitimilojn,
- (2) prizorgas la instrutekon,
- (3) zorgas pri la plievoluigado de la studadplanoj de AIS,
- (4) zorgas kune kun la senatano pri protokoloj pri la dokumentado de (SUSecaj kaj aliaj) studadsesioj kaj atestoj,
- (5) kontrolas kursojn kune realigataj en klerigejoj de AIS.

Senatano pri esplorado kaj evoluigado, kaj direktoro de la sciencoficio: OPROF. CARLO MINNAJA DR.

Dipartimento di Matematica Pura ed Applicata, Via Belzoni 7, I-35131 Padova; tel.: +39/49-620198; fakse: +39/49-8758596;
rete: minnaja@math.unipd.it

(Vicedirektoro: OProf. Horst S. HOLDGRÜN dr.)

La sciencoficio

- (1) instigas al sciencaj kunlaborprojektoj sub la tegmento de AIS,
- (2) kontrolas la realigadon de tiaj kunlaborprojektoj,
- (3) konsilas pri ilia administradmaniero,
- (4) kontrolas ilian taŭgan dokumentadon,
- (5) reprezentas la akademion en la (kun-)okazigado de sciencaj konferencoj.
Dum la senata deĵorperiodo 1996-1999 la senatano pri esplorado kaj evoluigado flegas krome
- (6) la kontakton de AIS al la registaraj instancoj de la Respubliko de San Marino.

Senatano pri publikaj rilatoj kaj informado, kaj direktoro de la informoficio: OPROF. DR. HABIL. REINHARD FÖSSMEIER

Dollmannstr. 19, D-81541 München 90;
tel. kaj fakse: +49/89-6518661; rete: reinhard.foessmeier@ixos.de

(Vicedirektoro: OProf. Hans Michael MAITZEN dr.)

La informoficio

- (1) nomumas kontaktpersonon al la organizoj de la Esperanto-Movado (la kontakton al UEA flegadas dum la deĵorperiodo 1996-1999 vicedirektoro Maitzen),
- (2) zorgas pri la kontaktoj al eŭropaj kaj internaciaj institucioj,
- (3) zorgas pri la publikigo de ISD kaj de la AIS-regularoj (dum la deĵorperiodo 1996-1999 kunlabore kun la senatano pri akademia identeco),
- (4) propagandas verkaĵojn el AIS kaj la „Acta Sanmarinensia“,
- (5) transprenas la informadon de la gazetaro,
- (6) kontrolas enhave kaj formale la „Acta Sanmarinensia“,
- (7) flegas la kontakton al Akademia Libroservo,
- (8) serĉadas alvokindajn scienculojn,
- (9) varbas studentojn, kandidatojn kaj partoprenantojn por SUSoj,
- (10) zorgas pri la marketingo de AIS (oferto de AIS-ajoj ktp.).

Senatano pri honorado kaj direktoro de la honoradoficio:

OPROF. HANS MICHAEL MAITZEN DR.

Institut für Astronomie, Türkenschanzstr. 17, A-1180 Wien;
tel.: +43/1-4706800-60; fakse: +43/1-470680015;
rete: maitzen@astro.ast.univie.ac.at

(Vicedirektoro: OProf. Dr. habil. Tyburcjusz TYBLEWSKI)

La honoradoficio

- (1) pledas kaze de misuzado de titoloj aŭ de honoraj rajtoj,
- (2) proponadas honorindajn personojn,
- (3) preparas honorajn ceremoniojn,
- (4) prizorgas la solenajn malfermojn kaj fermojn de SUS,
- (5) zorgas pri aligoj al ArS kaj TeS,
- (6) prizorgas la Premion Pirlot,
- (7) prizorgas la decan memorigon de mortintoj en ISD,
- (8) zorgas pri digna interna komunikado kaj eksterna sinprezentado de AIS.

Senatano pri akademia identeco kaj direktoro de la identecoficio:

OPROF. DR. HABIL. HELMAR FRANK

Kleinenberger Weg 16, D-33100 Paderborn; tel.: +49/5251-163511;
fakse: +49/5251-163533

(Vicedirektoro: OProf. Dr. habil. Tyburcjusz TYBLEWSKI)

La identecoficio

- (1) enarkivigas la plenajn protokolibrojn,
- (2) dokumentadas la AIS-historion,
- (3) observadas la plenumadon de la regularoj kaj de decidoj,
- (4) zorgas pri flegado kaj aktualigo de AIS-tradicioj,
- (5) prizorgas la okazigon de la Akademia Forumo dum SUS,
- (6) zorgas pri la plievoluigo kaj prezentado de la rekomendoj kaj doktrino de AIS.

Invito al la Asembleo de la Subtena Sektoro

Plenumante la artikolon 16.1 de la Apendico al la Statuto kaj la artikolon 1.7 (Bazaj preskriboj) de la Regularo pri kunsidoj estas kunvokata la Asembleo de la Subtena Sektoro de AIS al ties kunsido, kiu okazos lunde, la **1-an de septembro 1997**, 15:45-16:30 en Rimini (salono Boulanger) en la konstruaĵo de iama biblioteko (Viale C. Zavagli 73; enirejo de la preĝejo placeto, dekstre).

Tagordo:

1. Formalaĵoj (ĉeestanteco, kvorumeco, laborlingvoj, protokolo, tagordo, ĉeestrajto)
2. Ĝenerala raporto
3. Financa raporto; senŝargiĝo, AKU-kurzo
4. Decidoj pri proponoj skribe alvenintaj plej malfrue 24 horojn antaŭe
5. Kromaj tagordaj punktoj eventuale antaŭe anoncitaj per invitletero aŭ deciditaj dum la tagorda punkto 1
6. Eventuale necesaj elektoj
7. Diversaĵoj

Invito al la Ĝenerala Asembleo

Plenumante la artikolon 8.2 de la Apendico al la Statuto kaj la artikolon 1.8 (Bazaj preskriboj) de la Regularo pri kunsidoj estas kunvokata la Ĝenerala Asembleo de la Scienca Sektoro de AIS al ties 23-a kunsido, kiu okazos vendrede, la **5-an de septembro 1997**, 15:30-16:00h, en San Marino Città en la „Grand Hotel San Marino“ (salono Boulanger).

Tagordo:

1. Formalaĵoj (ĉeestanteco, kvorumeco, protokolo, tagordo, ĉeestrajto)
2. Ĝenerala raporto de la senato
3. Financa raporto, senŝargiĝo, buĝeto
4. Decidoj pri proponoj de la senato kaj pri aliaj proponoj skribe alvenintaj plej malfrue 72 horojn antaŭe kaj legeblaj en la SUS-oficejo almenaŭ 24 horojn antaŭe
5. Kromaj tagordaj punktoj eventuale antaŭe anoncitaj okaze de skriba kunvokado aŭ deciditaj dum la tagorda punkto 1
6. Diversaĵoj

La distribuo de materialoj aŭ la afiŝado kie ajn tio povus kaŭzi la impreson de aprobo fare de AIS bezonas la antaŭan permeson de la (vic)prezidanto aŭ de la direktoro de la Subtena Sektoro. Ekzistas speciala afiŝejo por tia agado de SUS-anoj. Dum la sesio bv. sekvi la plej aktualajn sciigojn de la SUS-oficejo anoncatajn sur tiu ĉi informtabulo.

© Kopiraĵto: AIS.

Prezo de la programo: 0,02 AKU (2,50 DM, 3000 LIT)

1997-06-13/1696pFR (PO/jl)